

**BHAGAVAD-GITA,
TIO ESTAS,
SUBLIMA KANTO
PRI LA
SENMORTECO**

Francisco Valdomiro Lorenz



Bhagavad-Gîtâ,

t. e.,

Sublima Kanto pri la
Senmorteco

El la sanskrita
originalo
verse tradukis

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ



FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
DEPARTAMENTO EDITORIAL

Rua Souza Valente, 17 - ZC-08
e Avenida Passos, 30 - ZC-58
20000 — Rio, RJ — Brasil



Francisco Valdomiro Lorenz

Ao prezadíssimo Amigo,

Sr.

Al la tre estimata Amiko,

Sinjoro

ANTÔNIO OLIVIO RODRIGUES

*que generosamente me ofertou
um exemplar de "Bhagavad-
Gîtâ" em sânscrito, dedico esta
tradução.*

*kiu grandanime donacis al mi
sanskritan ekzempleron de
"Bhagavad-Gîtâ", mi dediças
ĉitium tradukaĵon.*

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

S. Feliciano, R. G. do Sul, 28-9-1941



ISMAEL GOMES BRAGA

GRANDE DIVULGADOR DO ESPERANTO
— APRESENTADOR DESTA TRADUÇÃO

INDEKSO

Ĉapitroj:	Paĝoj:
Biblio kaj Bhagavad-Gitá	7
Antaŭparolo	9
I. — La Aflikto de Arguno	11
II. — Racia Spiritualismo	17
III. — La Religio de l' Agoj	25
IV. — La Religio de l' Kono	29
V. — Religio de senegoismaj Agoj	33
VI. — Religio de l' Sinregado	37
VII. — Spirita Kono	43
VIII. — La Mistero de l' Dia Ĉieĉeesto	47
IX. — La plej alta Scienco kaj la plej granda Mistero ..	51
X. — Observado de l' Dia Perfektecio	55
XI. — La Manifestado de la Dia Formo	59
XII. — Religio de Amo	67
XIII. — La Diferenco inter la Materio kaj la Spirito ..	69
XIV. — Pri la tri Kvalitoj de la Naturo	73
XV. — Pri l' Atingo de la Plej Alta Spirito	77
XVI. — Pri la Diferenco inter la Diaj kaj Demonaj Influoj	81
XVII. — Pri la tri Specoj de Kredo	85
XVIII. — Pri la Savo kaj Rezigno	89

2^o eldono en Esperanto

Kovrilo de CECCONI

El la sanskrita originalo verse tradukis
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

57-AA; 000.6-O; 12/1975

Copyright 1941 by
FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
(Brazila Spiritisma Federacio)
AV. PASSOS, 30 — ZC-58
20000 — Rio, RJ — Brazilo

Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de
Presejo de la Eldona Fako de FEB
Rua Souza Valente, 17 — ZC-08
20000 — Rio, RJ — Brazilo
C. G. C. n.º 33.644.857/0002-84 I. E. n.º 097.035.01

PRESITA EN BRAZILIO
Impresso no Brasil

2^o edição em Esperanto

Capa de CECCONI

Tradução do original sânscrito para o Esperanto por
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

57-AA; 000.6-O; 12/1975

Copyright 1941 by
FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
(Casa-Mãter do Espiritismo)
AV. PASSOS, 30 — ZC-58
20000 — Rio, RJ — Brasil

Composição, fotolitos e impressão offset das
Oficinas Gráficas do Depto. Editorial da FEB
Rua Souza Valente, 17 — ZC-08
20000 — Rio, RJ — Brasil
C. G. C. n.º 33.644.857/0002-84 I. E. n.º 097.035.01

Impresso no Brasil
PRESITA EN BRAZILIO

BIBLIO KAJ BHAGAVAD - GITĀ

En la eterna mondliteraturo estas du libroj, kies influo super la tuta civilizita homaro estas multe pli granda ol ni ordinare pensas, ĉar ili starigis kutimojn kaj leĝojn, kiuj regas la plej grandajn homsociojn. Vole-ne-vole eĉ la malamikoj de tiuj libroj estas de ili regataj. Eĉ la plej koleraĵ malamikoj de la Biblio, en la Okcidento, obeas ŝtatajn leĝojn, kies radikoj estas en la Biblio. Ni ĉiuj vivas en mondo regata de bibliaj principoj, kvankam nur malofte ni konscias tian influon sur nia vivo.

La Biblio estas la plej grava literatura verko en la Okcidento, kaj ĝia bonega traduko en Esperanto, farita de D-ro L. L. Zamenhof, jam fariĝis la fundamenta centro de la unueco de nia lingvo por ĉiuj landoj. Eĉ tiuj esperantistoj, kiuj neniam legis la Biblion en Esperanto, ricevas tiun unuecigan influon pere de lernolibroj, kies aŭtoroj paciencie studis la zamenhofan stilon en la Biblio; tial la Biblio jam estas ankaŭ el vidpunkto pure lingva la plej grava libro de la esperantistoj.

La dua gravega libro de la mondliteraturo estas Bhagavad-Gitā.

Ĝi ne multe influis la okcidentan vivon, sed en orientaj landoj ĝi influis eĉ multe pli ol la Biblio, ĉar ĝi estas pli malnova kaj uzata kiel Sankta Skribaĵo de la plej disvastigitaj religioj en Azio. Ĝi estis komponita en la 15a aŭ 14a jarcento antaŭ Kristo, do ĝi havas proksimume 3400 jarojn.

En nia okcidenta mondo ĝi ne estas rigardata kiel religia libro, sed nur kiel eminenta literatura verko, kiel mondfama poemo, kiu venkis la jarmilojn. Eble ĝi estas la plej antikva poemo en la mondo.

Ĝis nun tiu eterna monumento de la mondliteraturo ne estis aperinta en Esperanto. Ĝin traduki en versoj similaj al la majesta sanskrita originalo estis tre malfacila laboro, kiun neniu ĝis nun estis kuraĝinta entrepreni. Nia samideano Francisco Valdomiro Lorenz, lingvisto bone posedanta la sanskritan kaj Esperantan lingvojn, estas kredeble la sola poeto en la mondo, en nia tempo, kiu povas fari al la homaro tiun neniam forgeseblan servon. Ne nur pri lingvoj kaj poezia arto li estas kompetenta, ankaŭ pri Bhagavad-Gîtâ li estas aŭtoritatulo, ĉar li jam tradukis kaj komentariis tiun verkon en la portugala lingvo. Lia tradukaĵo de la eterna libro en nia nacia lingvo jam atingis tri eldonojn kaj certe restos ĉiam la plej ŝatata traduko.

Nun ni havas la feliĉon prezenti al la lernema esperantistaro de la tuta mondo la eternan poemon en belaj Esperantaj versoj, kiuj certe povos eterniĝi kiel la originala verko, kaj al la genia tradukinto ni prezentas nian tutkoran gratulon pro lia granda venko.

Ismael Gomes Braga

Rio de Janeiro,

Marto 1942.

ANTAŬPAROLO

Bhagavad-Gîtâ, laŭvorte "La Kanto de l' Sinjoro", ankaŭ nomata "Sublima Kanto pri la Senmorteco", estas epizodo el la granda, antikva eposo sanskrita "Mahâbhârata" ("La granda milito de la Bharatidoj"); ĝi prezentas interesantan dialogon inter la princo Arĝuno kaj lia majstro Kriŝno, konsiderata de l' hindoj kiel homa enkorpiĝo de la Plejalta Spirito. Tiu dialogo okazis en la komenco de la batalo inter la Kuruidoĵ kaj Pânduideoĵ (alinome Pândavoj), sur la Kuru-kampo, vasta ebenaĵo inter la riveroj Ĝumno kaj Sarsuti, nuntempe nomataĵ Kurul kaj Jheed (Ĝhid).

La kaŭzo de la milito inter la Kuruidoĵ kaj iliaĵ parencoĵ Pânduideoĵ aŭ Pândavoj estis jena: Ili ĉiuj estis idoj de la reĝo Kuru; la patro de la Kuruidoĵ (alinome Dhritarâŝtridoĵ) estis la reĝo Dhritarâŝtro, kaj la patro de l' Pânduideoĵ estis lia frato Pându, ankaŭ reĝo. Kiam Dhritarâŝtro blindiĝis, anstataŭis lin en regado lia filo Durjôdhano. Tiu-ĉi akiris, per maljustaj rimedoj, la tronon kaj regnon de Judhiŝtiro kaj ekzilis lin kaj liajn fratojn, inter kiuj la plej fama estis Arĝuno. La ekzilitoj revenis, post multaj aventuroĵ, en la naskolandon, akompanate de multaj amikoj kaj sampartianoĵ, kaj postulis siajn rajtojn kaj posedaĵojn. Durjôdhano rifuzis, preferante militon.

En la komenco de l' batalo Arĝuno, ĉefa estro de la Pânduideoĵ, petis Kriŝnon, kiu estis la kondukanto de lia batalĉaro, ke li haltigu la ĉaron en la interspaco inter la du

armeoj, kaj el tie li rigardis la Kuruidojn, kontraŭ kiuj li devis batali; kaj vidante ke tre multaj parencoj estis en ambaŭ armeoj, li afliktiĝis kaj diris al Kriŝno: "Mi ne batalos, ĉar se mi mortigus parencojn, mi ne povus vivi feliĉe; mi preferas eĉ ke ili min mortigu, nearmitan."

Tiam Kriŝno, kuraĝigante lin, komprenigis al li lian devon kaj eksplikis la spiritualisman doktrinon.

La esoteraj instruistoj asertas ke Bhagavad-Gitâ devas esti komprenata ne laŭlitere, sed en spirita senco, laŭ kiu ne estas rakontate pri historia milito, sed pri la batalo inter la "bono" kaj "malbono", kiu okazas en ĉiu homa animo. Arĝuno, kiu reprezentas la Homon, aperas sur la batalkampoj — la kampo de siaj agoj — inter du malamikaj armeoj, el kiuj unu (la Pânduideoj) signifas pli altajn, kaj la dua (la Kuruido) pli malaltajn spiritaĵojn. Tie staras Arĝuno, filo de Kunti, tio estas, filo de l' animo, kontraŭ siaj parencoj, filoj de Dhritarâstro, — la materia vivo —, kaj vidas la minacojn, de l' egoismo kaj de siaj deziroj kaj pasioj, kiuj formas armeon de iluzioj, kaj kiujn li devas venki, por ke li atingu la ekkonon de sia vera dieca esto. Ĉar multaj el tiuj iluzioj fariĝis al li agrablaj, li malfacile sin decidas batali kontraŭ ili.

Sed ankaŭ liaflanke estas fortaj batalantoj, nome: li mem (lia spirita esto), la volo de l' bono, la sindonemo al la dia volo, la amo de l' vero, la forto de konvinko (la kredo) ktp. Kriŝno, kiu instruas Arĝunon pri la vera homa naturo kaj lia rilato al Dio, estas la Dio-homo en ni mem (la eterna Kristo), nia pli alta, nemortema "MI".

La Tradukinto

Noto. — Mi skribas en la tradukaĵo la sanskritajn vortojn per Esperantaj literoj; tamen oni rimarku ke la sanskritaj vokaloj *a, i, u* estas ĉiam mallongaj, kaj *ā, ī, ū, e, o* ĉiam longaj. En la metriko mi imitas plej eble la originalon.

BHAGAVAD-GITA

OM

UNUA ĈAPITRO

LA AFLIKTO DE ARGUNO

Demandis Dhritarâstro:

1. Kion faris, ho Sanĝajo (1), sur la sankta Kuru-kampoj miaj kaj Pândavaj trupoj, kunirinte por batalo?

Respondis Sanĝajo:

2. Kiam vidis Durjôdhano, via fil' kaj armeestro, la Pândavojn batalpretajn, jene diris li al Drôno (2):
3. "Vidu, majstro, la falangon grandan de la Pânduideoj, komandatan de Drupado, via kapabla disĉiplo.
4. Jen heroaj pafarkistoj, al Arĝun' kaj Bhim' egalaj (3): Jujudhâno kaj Virâto, kaj Drupado sur ĉarego,
5. Dhriŝtaketu, Ĉĉekitâno kaj la reĝo de l' Kaŝioj, Puruĝit kaj Kuntibhōĝo, kaj la nobla reĝo Ŝajvjo,
6. l' eminenta Judhamânju kaj la forta Uttamaŭĝas, Subhadridô, Drupadidoj, ĉiuj sur batalĉaregoj.

(1) *Sanĝajo* (kies nomo signifas "Venkanto") estis fidela servisto de la blinda Dhritarâstro. La poeto Vjâso diras ke li estis vidinta kaj aŭdinta, per siaj spiritaĵoj organoj, ĉion kion li rakontas al sia reĝo.

(2) *Drôno*, la ĉefa komandanto de la Kuruida armeo.

(3) La herooj, menciataj en tiu verso kaj en la sekvantaj, prezentas (aŭ simboligas) intelektaĵojn, inkliojn, ecojn,

7. Sed, ho Dufojenaskito (4), ankaŭ sub mia komando estas famaj generaloj, kies nomojn nun mi diros:
8. Jen Vi mem, kaj Bhiŝmo (5), Karno, Kripo, la batal-
[venkanto,
Aŝvatthâmâ kaj Vikarno, kaj ankaŭ Sômadattido,
9. kaj aliaj bravherooj, pretaj pro mi doni vivon;
ĉiuj famaj sagjetantoj estas kaj luktistoj lertaj.
10. Ne sufiĉe forta estas tiu trupo, jen, de Bhiŝmo (5)
por venki la malamikan, fortan falangon de Bhimo;
11. do, okupu siajn lokojn ĉiuj niaj komandantoj
kaj preparu sin por doni al Bhiŝmo konvenan helpon."
12. Por eksciti la kuraĝon de l' soldatoj, la maljuna
Bhiŝmo enblovis en kornon, kiu sonis leonmuĝe.
13. Kaj eksonis tuj tumulte multaj kornoj kaj timpanoj,
multaj trumpetoj, cimbaloj kaj tamburoj bruegante.
14. Ankaŭ, starante sur ĉaro, tirata de blankĉevaloj (6),
Kriŝno kaj Arĝun' ĉielajn blovokornojn eksonigis:

pasiojn, artojn kaj sciencojn. La "ĉaroj" estas la korpoj, per kiuj ili sin manifestas en la homo. La pli malaltaj fortoj estas servantoj de l' egoismo kaj de la blinda instinkto; la pli altaj fortoj agas en harmonio kun la Dia Volo.

(4) *Dufojenaskita* (sanskrite "dviga") estas titolo, donata de hindo al respektindaj personoj.

(5) *Bhiŝmo* ("teruro") simboligas la egoisman obstinon; *Bhimo* ("fortega"), la spiritan volon.

(6) Blanka koloro estas simbolo de pureco; la ĉevalo, simbolo de l' forto kaj obeemo.

15. "Gigant-ostan" la Sensmastro (7), "Di-donacon" la Riĉ-
[estro (8);
"Kanan" eksonigis Bhimo, la sentima timigulo;
16. "Triumfan" la fil' de Kunti, justa reĝo Judhiŝtiro;
Sahadêvo kaj Nakulo "Belfloran" kaj "Dolĉasonan".
17. Blovis ankaŭ en la kornojn: de l' Kaŝia land' la reĝo,
Dhriŝtadjumno kaj Sikhandi, Jujudhâno kaj Virâto,
18. Drupado kaj Drupadidoj el ĉiuj lokoj de l' tero,
la brakforta Subhadrido: ĉiu en la propran kornon.
19. Tiu bruo ekvibrigis la ĉielon kaj la teron,
kaj tremigis eĉ la korojn de l' Dhritarâŝtridoj bravaj.
20. Vidante pretajn batali la Kuruojn, jen Arĝuno
ĉe l' simi-figur-standardo (9), kiam sagoj jam ekflugis,
21. diris al Kriŝno: "Bonvolu, Sinjor', haltigi la ĉaron
tie en la interspaco meze de la du armeoj;
22. mi rigardi volas tiujn, kiuj formis la falangojn
lukt-avidajn, kontraŭ kiuj nun mi devas ekbatali.
23. Mi komprenas ja ke ili volas plaĉi per batalo
al la malbonkora filo de la blinda Dhritarâŝtro."

(Parolas Sanĝajo):

24. Plenumante tiun peton de Arĝun', la Sensomastro
haltigis la ĉaron meze de la indikita spaco,

(7) Sensmastro (Hriŝikêŝo) = Kriŝno.

(8) Riĉestro (Dhananĝajo) = Arĝuno.

(9) La standardo, kiun Arĝuno, laŭ la antikvaj kutimoj de l' hindo, portis en sia ĉaro, havis la figuron de simio.

25. antaŭ Bhiŝmo, antaŭ Drôno, antaŭ ĉiuj popolestroj,
kaj ekdiris: "Kunirintaj tie, jen la Kuruido!"
26. Kaj ekvidis Arĝun' ke estis patroj, avoj, filoj, fratoj,
nepoj, onkloj kaj bopatroj, instruistoj kaj amikoj,
27. malamike dividitaj en du arojn, du armeojn.
Vidante ke ĉiuj estas unu sama parenkaro,
28. malĝoĝigis kompateme li kaj jene ekparolis:
"Dum mi vidas la parencojn, kiuj venis ĉi batal,
29. miaj membroj perdas fortojn, la palaj vangoj sekiĝas;
trem' atakas mian korpon, kaj la harojn la teruro;
30. l' arko falas el la mano, febro bruligas la haŭton;
perturbiĝas miaj pensoj, la piedoj ŝanceliĝas.
31. En l' aer' mi vidas signojn malfeliĉajn, Belharulo(10)!
Ve al mi se mi mortigos en batal' parencajn homojn!
32. Venkon, regnon, voluptaĵojn ne deziras mi, ho Kriŝno!
Ĉar al kio servus ili, aŭ riĉec' aŭ eĉ la vivo?!
33. De kiuj ni volas preni tiajn aĵojn, ili mem, jen,
volas riski la riĉecojn kaj la vivon en batalo:
34. ili estas instruistoj, patroj, filoj, avoj, nepoj,
onkloj, bopatroj, bofratoj, multaj samfamilianoj;
35. Kriŝno, ilin mi mortigi ne deziras, nek por estri
teran regnon, nek por regi iun eĉ el la tri mondoj.
36. Ĉar se mi mortigos ilin, kia estos nia ĝojo?
Ni per krimo nin makulus, malgraŭ maljustec' ilia.

(10) Belharulo (Kêŝava) = Kriŝno.

37. Mortigante la parencojn, la idojn de Dhritarâstro,
ni neniam povus ĝui feliĉon en nia vivo.
38. Eĉ se ili, blindigitaj per avido, ne komprenas
ke grandega peko estas mortigi parencojn siajn,
39. kiel povus ni permesi ke fariĝu tia peko,
se ni, ho Adorindulo, konas ĝian maljustecon?!
40. Ekstermo de familio virton kaj leĝon detruas;
se la virto malaperas, pligrandiĝas malpieco;
41. kiàm reĝas malpieco, koruptiĝas la virinoj;
kiam reĝas la malvirtoj, sociordo konfuziĝas.
42. Glutas l' infer' la murdantojn de parencoj, kaj la genton;
ne havante oferaĵojn, falas el ĉiel' prapatroj (11).
43. Konsekvence de la murdoj kaj konfuzoj de la ordo
renversiĝas eĉ la sanktaj leĝoj de la familio.
44. Kiam estas renversitaj tiuj gravaj, sanktaj leĝoj,
en l' infer' la homoj vivos; tiel diras niaj libroj.
45. Ha! decidon tre malbonan faris ni, pro regdeziro,
ke ni venis ĉi, volante niajn parencojn mortigi!
46. Mi preferus ke vibrantaj sagoj de Dhritarâstridoj
min mortigu nearmitan, al ili ne rezistantan."

(Parolas Sangajo):

47. Tion Arĝuno dirinte, sur la ĉarseĝon sidiĝis
kaj, sentante malĝojecon, lasis fali la pafarkon.

(11) Laŭ la esotera doktrino, la "prapatro" de ĉiu homo estas lia propra spirita individueco, lia senmortema animo, kiu sin prezentas en ĉiu reenkorpiĝo sub la masko de nova person-

DUA ĈAPITRO

SANKHJA - JŪGA (RACIA SPIRITUALISMO)

(Parolas Sangĝajo):

1. Al Arĝuno afliktita, larmojn amarajn versanta
kaj kuraĝon ekperdanta pro kompatato, diris Kriŝno:

(Parolas La Sinjoro, t. e. Kriŝno):

2. "El kie, Arĝuno, venas la subita malkuraĝo,
kiu, maldigna de l' viroj, al ĉiel' la vojon fermas?!
3. Vi al ĝi vin ne liveru; ĝi al honestul' ne decas;
ĝin forskuu, ho venkanto, kaj decida eklevigu!"

(Parolas Arĝuno):

4. Kiel povos mi ataki en batalo, ho Heroo,
avon Bhiŝmon, kiel Drōnon, kiuj ambaŭ mi estimas?!
5. Almozan panon manĝi mi preferus
tutvive, ol mortigi ŝatindulojn;
se mi mortigus ilin, eĉ maljustajn,
makulus sango ĉiun mian manĝon.
6. Ne scias ni, ĉu estos preferinde
se NI venkantoj estos, aŭ se ILI;
sed vivi ne dezirus mi, se mortus
per miaj manoj la Dhritarâŝtridoj.

eco. Me la spirita konscienco de l' animo ne ricevas nutraĵon dum la vivo sur la tero, la materia parto atingas superecon, kaj la "prapatro falas el la ĉielo", tio estas: la homo mem falas en pli malaltan staton.

7. Kompatpremate kaj timante peki,
la sanktan leĝon mi obei volas
kaj vian saĝan konsilon mi petas;
instruu, Kriŝno, min, vian disĉiplon.
8. Ne scias mi forpeli la malĝojon,
kaj ĝi sekigas miajn lacajn sensojn
kaj ne plimalgrandiĝus, eĉ se gajnus
mi la plej vastan regnon sur la tero.”
9. Post parolo tiu diris al la Belharul' Arguno:
“Ne batalos mi, ho ne!” kaj eksilentis, tre malĝoja.
10. Tiam milde ridetante, al l' amiko afliktita
ekparolis jene Kriŝno, inter tiuj du armeoj:

(Parolas La Sinjoro):
11. “Sen neces' vi vin ĉagrenas, sed vi diras saĝajn vortojn.
Pro mortintoj ne afliktas sin saĝul', nek pro vivantoj.
12. Ĉar ne estis iam tempo, en kiu ni ne ekzistus,
kaj neniam ekmalestos mi aŭ vi aŭ tiuj princoj.
13. En la korp' l' animo pasas l' aĝon junan kaj maljunan;
post la morto de la korpo ĝi en nova korpo vivos.
14. Sciu tion kaj ne timu. L'elementoj naskas varmon,
malvarmon, doloron, ĝojon; tiajn ŝanĝojn vi suferu.
15. Kiu estas ĉiam firma en feliĉ' kaj en doloro,
tiu venkas tiajn ŝanĝojn kaj atingos senmortecon.
16. Kio ne ekzistas vere, neniam povas estiĝi,
kaj ne povas ekmalesti, kio havas veran eston.
17. Kiel la saĝuloj, sciu ke nedetruenda estas
la eterna Tio, kiu etendis la Univerŝon.

18. Pereaĵ estas la korpoj, posedataj de l' spirito
nemortema kaj senfina. Tial luktu, Bharatido!
19. Kiu diras: “Mi mortigos”, aŭ: “Mi estos mortigita”,
tre eraras; nek mortigi povas iu, nek mortiĝi.
20. Nek mortas, nek naskiĝas la spirito;
komencon ĝi ne havas nek finiĝon;
ne-naskiĝinta, senŝanĝa, eterna,
ne mortas ĝi eĉ l' morto de la korpo.
21. Se eterna, sennaskiĝa estas la spirit', senfina
kaj nedetruenda, kiel povus oni ĝin mortigi?
22. Kiel la homoj malnovajn vestaĵojn
demetas kaj surmetas poste novajn,
simile la spirit' malnovan korpon
forlasas kaj eniras korpon novan.
23. Ne vundigas ĝin armiloj, ne bruligas fajra flamo;
akvo ĝin ne malsekigas, ne sekigas venta blovo.
24. Estas ĝi nepenetrebla, nebruligebla, eterna,
ĉion-penetranta, firma, nevundebla, neborebla,
nevidebla, neŝanĝebla, per sensoj neperceptebla;
tial vi, ĝin agnoskante, ne daŭrigu l' afliktajn.
25. Sed eĉ se vi opinias ke realaj aĵoj estas
la naskiĝo kaj la morto: kial vi vin mem afliktas?
27. Ke naskiĝon sekvas morto, kiel morton renaskiĝo,
estas ja neevitebla; tion malĝojo ne ŝanĝos.
28. Nenentebla la komenco kaj la fin' de l' vivo estas,
kaj sentebla nur la mezo; kial tion ni priploru?
29. Kiel miraklon la spiriton iuj
al si imagas; kiel pri miraklo
parolas pri ĝi iuj, aŭ diraŭdas;
sed per diraŭdo oni ĝin ne konas.

30. Nevundebla ĉiam estas la spirit' en ĉies korpo; vi ne devas do malĝoji pro la sorto de l' estaĵoj.
31. Ankaŭ se vi konsideras vian militistan devon, lukti devas vi heroe en laŭleĝa ĉi batalo.
32. Estas dev' de militisto, ke batalu li, kaj bone; tia honoro malfermas al li de l' ĉiel' la pordon.
33. Se malvolos vi batali, fuĝante de l' leĝa devo, estos via malhonoro, pri kiu ĉiuj parolos.
34. Kaj al viro noblanima malhonor' kaj malestimo, kiujn li suferi devas, pezas multe pli ol morto.
35. Ĉiuj viaj generaloj opinios ja, ke timo vin fuĝigis malkuraĝan, kaj ili vin malestimos.
36. Viaj malamikoj mokos, hontparole vin mallaŭdos: Ĉu vi pensas ke fariĝi povas pli granda malbono?
37. Se vi mortos batalante, vi eniros la ĉielon; se venkos, posedos landon; ekbatalu do, kuraĝe!
38. Goj', doloro, gajno, perdo, venk', malvenk': ili egalaj al vi estu; vi batalu kaj evitu pekan agon.
39. Ĝisnun mi al vi konigis Sankhjon, racian doktrinon; aŭdu ankaŭ la Jogian (1), donantan spiritliberon.
40. Studi ĝin ne estas vane, sed utilon grandan donas, kaj fuĝigas grandan timon eĉ de ĝi malgranda kono.
41. Tiu studo ja kondukas la menson al konstanteco, ĉar nekonstantuloj perdas la celon per malatento.

(1) La *Jōga*, aŭ doktrino Jogia, estas spiritualisma filozofio kaj ĝia praktikado. La vorto "Jōga" signifas "Unuiĝo", simile al la originala signifo de la vorto "Religio": re-lig-iĝo al la Spirito Dia.

42. Iuj nesaĝuloj amas citi ofte Sanktajn Librojn kaj disputi pri paroloj, sen scii la veran sencon;
 43. avidaj je posedadoj kaj estrad', ili promesas ĉielon al tiu, kiu sekvadas iliajn ritojn.
 44. Sciu ke eraras ili kaj, riĉecon avidante, ne scipovas koncentrigi en medito sian menson.
 45. Laŭ la Sanktaj Libroj, havas la Naturo tri kvalitojn; estu libera de ili, de l' kontraŭoj, iluzioj.
 46. Kiel akvo el putego servas por diversaj uzoj, multuze la Sanktaj Libroj servas al student' prudenta.
 47. Ne pro rekompenco agu, sed por fari vian devon; nek estu maldiligenta, nek agu pro nura gajno.
 48. Vian devon vi plenumu, sen avid' aŭ ambicio, kiel faras la jogioj, kia ajn la sorto estas.
 49. Ĝustan penson vi kulturu; ĝi pli gravas eĉ ol ago. Malfeliĉa estas, kiun nur premi' al ago pelas.
 50. Kiel la jogioj, penu vin altigi super ajnan rezultaton de la faroj, feliĉan aŭ malfeliĉan.
 51. Kiu rezignas je l' eblaj frutoj de siaj bonagoj, liberigas de l' mondiro kaj de ĝiaj malfeliĉoj.
 52. Kiam vi la iluziojn venkos, neplu vi disputos pri doktrinoj aŭ pri kredoj, aŭ pri religiaj ritoj;
 53. libera de opinioj alihomaj, via menso firma kaj unuigita kun la Spirito sin sentos."
- (Parolas Arĝuno):
54. "Kiel, Majstro, distingiĝas la jogioj vere saĝaj? Kiel ili kondukadas, kiel paroli kutimas?"

(Respondas La Sinjoro):

55. "Estas saĝulo la homo kiu, kun si mem kontenta, forlasis ĉiujn dezirojn, kiuj affliktas la koron;
56. kaj se lin ne afekcias malagrablo nek agrablo, tim', pasio, nek kolero: estas li saĝulo sankta.
57. La saĝul' eltenas firme ĉiujn ŝanĝojn de la sorto; nek ĝojego nek malĝojo skuas lian mensopacon.
58. Kiel la membrojn testudo en sian ŝelon retiras, tiel li de l' sensobjektoj scias retiri la sensojn.
59. Abstinema hom' forpelas de la mens' sentum-impresojn; la saĝulo liberigās eĉ de tentoj kaj deziroj.
60. La perfortaj sensoj venkas iam eĉ prudentan homon, malgraŭ ke la volo penas rezistadi serioze.
61. Sed saĝulo venkas tentojn, ĉar al MI (2) li sin konfidas, memorante ke la sensoj devas nepre MIN obei.
62. Kiu pensas pri sensaĵoj, naskas inklinon al ili; el inklin' dezir' devenas, kiu kaŭzas la pasion;
63. tiu naskas malprudenton, kiu perturbas la menson; tiam perdas sin racio, kaj la homo mem sin perdas.
64. Male, kiu sensobjektojn nek deziras, nek forfuĝas, sed egalanima restas, atingas la menstrankvilon.
65. Menso trankvila forpelas de l' homo ĉiujn affliktojn kaj altiras la enfluan de la saĝo kaj scienco.
66. Homo sen trankvilo mensa memkonscion ne posedas, kaj kie trankvilo mankas, feliĉo ne povas esti.

(2) La pli alta, eterna MI, estas ĉiam unuigita kun DIO.

67. Kies menso submetita estas al la sensmovado, estas kiel ŝipo, kiun ventoj pelas sur la maro.
68. Tial havas firman saĝon nur la homo, kiu restas ĉiam mastro de l' sentumoj, kaj ne sklavo de la sentoj.
69. Por li estas hela tago, kion nokt' aliaj nomas, kaj li nomas nokto, kio ŝajnas tag' al nesaguloj.
70. Ricevas ondojn mar', sed ne elfluas el sia lim'; trankvila tiel restas saĝul' eĉ se deziroj lin eniras, al kiuj cedas ĝuamant' nesaĝa.
71. Se, libera de deziroj, egoismo kaj fiero, vivas hom' prudenta, certe trovos li la sanktan Pacon,
72. kiu estas vivo dia, stato de feliĉo plena (3), kaj kiam la morto venos, li kun DIO unuigās."

(3) Tiu stato estas nomata "Nirvano".